

# JAZYK VŠESLOVANSKÝ A ESPERANTO.

Napsal Jos. Krumpholtz. — (Pokračování.)

Jak patrně, otázka umělého jazyka všeslovanského není tak absurdní, jak se na pohled mnohému snad vidí; zřejmo to i z toho, že sám slovatný slavista Budilovič, autor díla »Обščеславјанскіј јазык«, uznává Križaničův pokus o umělý jazyk všeslovanský za daleko reálnější a plodnější formu jazykového sjednocení Slovanů než samu ideu Kollárovu mnohojazyčnosti, říká o něm: »Na papíře tento způsob utvoření společného slovanského jazyka, na základě ruském s příměsky chorvatskými a společnými proudy ostatních slovanských nářečí, jeví se dost vhodný k účelu. Některá umělost takového utvoření a upotřebení eklektického přijímání u výběru tvarů a slov je dost obyčejná v dějinách utvoření společných jazykův. I Aischyl úmyslně zjemňoval svůj atticismus dorickými tvary, i Dante vnesl na toskánský pramen svého »illustre vulgare« nemálo vzorů sicilského a holoňského původu; Lutr vhodně vybral z říšského jazyka a z prostomluvy durinsko-saské, co zdálo se mu nejpochoptitelnějším pro Němce i horního i dolního Německa«.

Mluvě pak o Herkelových »Základech všeslovanského jazyka« z r. 1826, praví: »Proti „logickému“ zpracování *kteréhokoli* literárního jazyka nebo nářečí nelze ničeho namítati. Ve větší, menší máte zpracování to odráží se v dějinách všech vzdělaných jazyků . . .«

A jinde opět píše: »Písemný jazyk vzdělává se spisovateli, ne čtenáři; tedy jednotlivci, ne smíchaným davem. Je to ne divoká, nýbrž kulturní rostlinka, na jejímž rozkvětu účastní se společně příroda i rozum . . .«

Vratme se však ještě k Tolstému a uvažme:

Na přirozené splynutí jazyků slovanských v jeden v dohledně době není ani pomyšlení, třebaže myšlenka

ta tanula na mysli již Jungmannovi, Kollárovi, Purkyňovi a (mutatis mutandis) i Herkelovi, Majarovi, ba i — Nerudovi.

Na rozšíření znalosti jazyků, t. j. mnohojazyčnosti, jak žádal Kollár (1836) Kuzmány (1838) a j. rovněž nelze mysliti, jak dokázal výsledek Kollárovy ideje. Zbývá tedy buď zvoliti jeden jazyk národní za společný, nebo přijat jazyk umělý — utvořený.

Co tedy? Potřeba jazyka dorozumivacího den ze dne vzrůstá a je stále akutnější. Jdeť o prostředek, kterýmž by spojeny byly nejen jednotlivé větve národa 150 millionového, ale i o snadnější styk ostatních národu se Slovany. Kromě toho jazyk takový nutný jest i pro všelidský pokrok. Třeba tedy jednati a rozhodnouti se: národní či umělý, utvořený?...

Dejme tedy tomu, že národní a abychom se dlouho nepřeli který, řekněme hned třeba — ruský, jakožto nejvíc všeslovanský, nejbohatší, nejsilnější a že má nejvyšší váhu pro svou skutečnou rozšířenost, vědeckou vytříbenost, literární platnost atd., atd. Je tím však otázka naše již rozřešena? Aní z daleka! Slyšme, co soudí o tom ti, již ruštinu všeslovanským jazykem už vidí.

Rus Pogodin píše r. 1839 ministru národní osvěty hr. S. S. Uvarovi: »Ruský jazyk... sám o sobě, beze všech násilných prostředkův, dřív než později stane se společným písemným jazykem slovanským, jako u některých plemen bylo dříve nářečí bulharské a v západní Evropě latinské. Všechna nářečí musí přinést (však) dříve (!) jemu daň svými slovy, obraty, formami...«

A stalo se tak už? Jestliže ano, proč ještě r. 1888 žádá Dobrjanský ve »Varšavském Denníku« založení všeslovanské akademie slovesných nauk, kteráž by mimo jiné vypudila z ruštiny podobné barbarismy, jako: frajlina, oberprokuror atd., jež zsměšňují ruštinu v očích Slovanů a překážejí uznati ji jazykem všeslovanským... Jen potom, pokračuje Dobrjanský, mohl by jazyk ruský proniknouti nejen v horní, ale i v dolní vrstvy všech slovanských národností...« (Pokrač.)



## INTERNACIAJ PAGOJ.

Speciale por »Český Esperantista« boheme verkis JUDr. Jos. Bürger.

(Daŭrigo.)

Kiel en la komerco ĝenerale, tiel ankaŭ en la komerco internacia estas regulo ne pagi la komercaĵon kontante, sed

doni por ĝi kambion. Tiel, se oni observas la reciprokan rilaton de du ŝtatoj, en ambaŭ ŝtatoj estos en ĉiu tempo eksportantoj, kiuj posedas devisojn de alia ŝtato, kaj importantoj, kiuj devas pagi al alia ŝtato, ĉar ili tien sendis por la komercaĵo kambion kun sia subskribo. La devisaj ŝuldantoj profite aĉetas de kreditoroj samlandaj tiom da deviso de fremda ŝtato, kiom valoras ilia ŝuldo, sendas la devisojn en fremdan regnon al sia komerca amiko, por ke li prizorgu la enkasigon kaj per la ricevita valuto pagu ilian ŝuldon en fremda regno. Tiamaniere la ŝuldanto ŝparas la kostojn transportajn, asekurajn (ili malpligrandigas), monpresajn (ili tute malaperas) kaj li ne havas malprofiton rentuman, ĉar li ne pagis al posedanto de la deviso la plenan valuton, sed li rabatis por si la diskonton por la tempo ĝis la pagdato de laambio. Similan profiton akiras ankaŭ posedanto de la deviso.

Pro la reciproka utilo estas en ĉiu ŝtato vigle serĉataj deviso, el kiuj neniu estas pagata kontante, sed ĉiuj estas profite uzataj por pagi fremdlanden. La deviso havas kiel ĉiu alia komercaĵo ŝanĝigantan valoron nomatan kambia kurso, la komercantoj pri deviso estas bankoj kaj foirejo por la deviso estas monborso.

La kambia kurso dependas de la postulo (demando) kaj propono kaj tiu ĉi evidente de la internacia bilanco de pagoj de tiu aŭ alia ŝtato. Tia stato de kambiaj kursoj, kia respondas al monera parito de ambaŭ komparataj ŝtatoj, estas konsiderata kiel norma kaj ĉiam, kiam la kambiaj kursoj haltas en ĝi, oni diras, ke ili estas »al pari«. Ekzemple: el unu kilogramo da oro estas fabrikataj 3280 K kaj 2790 M; per divido facile oni kalkulas moneran pariton 100 M = 117,5627 K kaj tiam, kiam deviso por Berlino tiom valoras en Wien, kambiaj kursoj por Germanujo estas al pari.

La movado de kambiaj kursoj, ĉu supren ĉu malsupren, estas limigata en la okazo, se ambaŭ landoj havas tian valutan organizon, ke ĉiam ajn oni povas ricevi por unu kilogramo da oro certan multon da pagiloj de enlanda valuto kaj kontraŭe, ĉiam ajn oni povas ricevi por egala multo da kiaj ajn pagiloj de la sama valuto unu kilogramon da oro. En tiu ĉi okazo la situacio de la ŝuldanto estas pli libera ol en la ŝtato nehavanta similan organizon. En la lasta okazo la ŝuldanto disponas sole fremdajn pagilojn estantajn en la lando kaj devisojn, alimaniere li ne povas liberigi sin de la ŝuldo. Kontraŭe en la unua okazo la ŝuldanto disponas du

manierojn, kiel pagi, per sendo aŭ de devisoĵ aŭ de (fremdaj pagiloj respektive) oro, kaj li certe ĉiam faras decidon por maniero malpli multekosta. La ekzemplo tion klarigos. En Germanujo oni povas ĉiam ajn fari la supre priskribatan intersanĝon de oro kaj de markoj kaj ankaŭ en Aŭstrio — kvankam la leĝo ne garantias, ke por 3280 K ĉiu devas ricevi kilogramon da oro, tamen tio estas fakte praktikata, ĉar la aŭstri-hungaria banko, kvankam ĝi ne estas devigata fari tion, laŭ deziro pagas prezentitajn banknotojn per oro. Sekve, se oni devas pagi el Praha en Berlin'on 100 M, oni ĉiuokaze povas fari tion kun jenaj elspezoj:

- a) por akiro de oro por preso respektive  
 ŝanĝo de markoj . . . . . K 117'5627
- b) 0'5073% da tio kiel elspezoj por sendo,  
 asekuro, preso k. t. p. . . . . » 0'5964  
 sume . . . . . K 118'1591

Tio estas la plej alta prezo, kiun ĉi-tieaj ŝuldantoj konsentos pagi por Berlin'a deviso, kaj tiam, kiam la kambia kurso atingis tian altecon, oni diras, ke ĝi estas en la punkto de oreksporto. Per simila kalkulo oni konstatas, ke la posedanto de Berlin'a deviso postulos por ĝi minimume 116'9663 K, per kio estas samtempe difnita la punkto de orimporto. Per la sama maniero oni povas difni la pariton valutan kaj ambaŭ orpunktojn ankaŭ por aliaj landoj, kiuj enkondukis pagadon kontantan; landoj nehavantaj kontantan pagadon havas sole pariton valutan kaj, se ili presas la monerojn el alia metalo ol la ŝtato, kun kiu ili estas komparataj, ili ne havas eĉ monan pariton. (Daŭrigo.)



## IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis Jos. Krumpholtz.

(5. daŭrigo.)

Sed por tiuj grandaj celoj la *lingvo latina*, en tiu tempo universala, ne sufiĉis. Kostis multe da batoj kaj grandan perdon de tempo ol oni ellernis la malvivan lingvon latinan tiom, kiom estis bezone por iom vive paroli kaj interkompreniĝi kun instruituloj. Tial Comenius, kvankam li konsentis kun Hispano *Ludoviko Vives*, ke unu lingvo komuna estas

necesa por la mondo kaj, se ne ekzistus alia, ke oni estus prava prefere la lingvon latinan ol la alian por tiu celo difini, tamen li diras: »Sed ĉar niaj ideoj nun pli alten celas, ni ne povas alie ol pli volonte konsili lingvon tute novan«... »ĉar mi dubas kun mia saĝa *Mersennius*, ĉu estus inde tiom da laboro riski por la lingvo latina, se oni povus pli facile krei lingvon novan, pli perfektan...«<sup>\*)</sup>

Motivoj kaj argumentoj de Comenius kontraŭ la lingvo latina kaj por nova lingvo universala estis:

Per lingvo universala aŭ komuna devas konsiliĝi kaj zorgi egale ĉiuj homoj; sed per la lingvo latina konsiliĝus kaj zorgus precipe ni mem, al kiuj ĝi jam estas konata, ne tiel nacioj necivilizitaj (al kiuj, ĉar ili pli grandan parton de la mondo okupas, ankaŭ pli grandan atenton oni devas dediĉi), al kiuj la lingvo latina tiel same kiel la lingvoj aliaj, eĉ pli multe estas nekonata kaj nefacila, ĉar ĝi, estante tro laboriga, postulas multejaran penadon kaj energian studadon. Ĝi certe estas plena da diversaj kazoj kaj ĉe la verboj da modoj kaj tempoj, en la sintakso da vortordo kaj en ĉio ĉi plena da neregulaĵoj.

La *lingvo itala*, el lingvo latina deveniĝinta, estas certe pli facila, sed tamen ankaŭ ĝi havas sufiĉe da neregulaĵoj.

Plue estas bezone, ke la lingvo universala estu pli facila ol ĉiuj ceteraj lingvoj kaj tiel sufiĉa por perfekta kaj facila esprimado de ĉiuj aferoj kaj ideoj — kia ne estas la lingvo latina, ne havanta sufiĉe da kunmetitaj nek devenigitaj vortoj. Kaj tiel ĝi sufiĉas nek por si mem, nek por aferoj.

Kaj kio estas plej grava: la lingvo universala devas esti universala veneno kontraŭ la konfuzado de ideoj... Kaj tio ne estas la lingvo latina nek kiu ajn lingvo alia, ĉar homoj estintaj, aŭtoroj de niaj lingvoj, ne atentis la diferencojn de aferoj kaj signis per vortoj sole la aferojn konatajn, ne zorgante pri la rilato kaj proporcio inter la sono kaj afero. Tial oni trovas ĉie tiom da vortoj sinonimaj, homnimaj (diverssignifaj), paronimaj (devenigitaj), da tropoj, vortoj multsignifaj, duboj kaj pleonasmoj.

Tial restas nenio alia ol krei lingvon novan, kiu estu:

1. pli facila ol ĉiuj aliaj, por ke oni povu ĝin lerni sen perdo de tempo kaj aferoj;
2. pli ĉarma ol ĉiuj ceteraj, por ke estu ĝojego ĝin instrui kaj lerni; kaj

<sup>\*)</sup> Comenius al Hartlib 12. VI. 1647.

3. harmonia, t. e. ne kaŭzanta nekonformaĵojn (neharmoniaĵojn) inter aferoj kaj ideoj pri ili.

Sed la plej grava afero estas, ke la lingvo universala estu la universala veneno kontraŭ la konfuzado de ideoj, enhavante nek pli multe nek pli malmulte da vortoj ol estas da aferoj, kaj ordigante ilin tiel same, kiel la aferoj solaj sin ordigas, ke ĝi estu liberigita de vortoj homonimaj, sinonimaj, paronimaj, de tropoj, pleonasmoj k. t. p.

»Kaj se tiu lingvo estus akceptita per komuna konsento de homa generacio, komprenus kaj ĝojus ĉiuj, ke ĝi estos la plej konforma ilo por unuigo de homoj kaj de vero kun ideoj pri aferoj.«

(Daurigo.)



## LA UNUA IDEALO.

De J. Arbes. — (Fino.)

La tago, kiam mi ekiris la returnan vojon, estis nuba kaj malvarma. Mi devis ses horojn piediri, antaŭ ol mi atingis pli grandan urbon, de kie fervojo kondukis al Praha.

Sed mi iris malrapide, atingis la urbon nur vespere kaj tuj direktis la paŝojn al la stacidomo.

La vagonaro estis forveturonta post kvaronhoro.

En la vestiblo, en la koridoroj kaj atendejoj regis kutimaj bruoj kaj muĝo. Sed la bruanta aro da homoj ne interesis min — sole al tiu aŭ alia pli karakteriza fizionomio mi dediĉis momenton de l'atento.

Jam mi volis ekiri al la biletvendejo, kiam mia rigardo ankoraŭ unu fojon senvole ektrondis sur la bruanta aro kaj okaze fikse haltis sur virina staturo apud la lasta kolono de l'vestiblo, kie svarmis malpli da homoj ol en la antaŭo kaj proksime de la biletvendejo.

Mi restis kvazaŭ trafita de la fulmo.

La idealo de miaj revoj staris sole kelke da paŝoj antaŭ mi. Ĝi estis pala, apenaŭ dekseksjara knabino kun poezie melankolia mieno de l'antike sendifekta vizaĝo.

Mi memoras nenion plu, krom ke ŝi estis vestita en nigra silka vesto de la plej eleganta formo kaj ke mallonga nigra vualo kovris ŝiajn frunton kaj okulojn. En unu mano ŝi tenis malgrandan vojaĝkofreton kaj apogante sin iomete sur la kolono ŝi rigardis trankvile ien en malprecizita malplenon.

Priskribi la impreson, kiun la neatendita apero faris sur min, estas tute neeble. Mi eĉ ne scias, kiel longe mi

staris kvazaŭ rigida, fiksante sur la knabino nedeturneble la rigardon.

Post la momento alpaŝis al ŝi iu pliaĝa sinjoro kaj silente diris ion al ŝi. Ŝian ĉarmoplenan vizaĝon trakuris facila ekrido de l'danko. Ŝi klinis iomete la kapon kaj ankaŭ silente diris ion. Poste la sinjoro donis al ŝi la brakon, ŝi akceptis ĝin kaj ambaŭ malrapide, paŝo post paŝo, iris al la pordo kondukanta al la perono.

Senvole mi ŝteliris post ili.

La vagonaro estis preta por forveturi — ĵus oni sonoris la duan fojon.

La sinjoro kaj la sinjorino direktis la paŝojn al la vagono de dua klaso, antaŭ kiu ili haltis.

La suno malleviĝanta al la okcidento okaze trabilis la ruĝetan nubon kaj ĉirkaŭe disvastiĝis neesprimeble melankolia duonlumo aŭtuna.

En tiu momento la sinjorino ekrigardis al mi. Freŝa venteto forblovis la mallongan vualon de ŝiaj okuloj, en kiuj rebrilis ruĝeta, sed malvarma fulmo... Ili estis ja vitraj...

Kio okazis en mia animo, estas nepriskribebla. Mi scias sole, ke nur post pli longa tempo mi rememoris, ke mi ne havas bileton.

Rapide mi revenis al la kaso. Sed antaŭ ol mi atingis ĝin, eksonis la tria sonoro — la kaso estis jam fermita.

El bohema lingvo kun la permeso de l'aŭtoro tradukis *Jos. Grňa*.



## LA BELULINO KAJ LA BESTO.

Malnova franca fabelo de s-ino *Leprince de Beaumont*.

(Daurigo.)

La ĉevalo propramove sekvis unu el la vojoj en la arbaro kaj post malmulte da horoj, la bonulo alvenis en sian dometon. Liaj infanoj ariĝis ĉirkaŭ li; sed anstataŭ repagi iliajn karesojn, la negocisto, ilin rigardante, ekploregis. Li tenis en la mano la rozbranĉeton alportitan por la Belulino; li ĝin donis al ŝi dirante: »Belulino, prenu tiujn ĉi rozojn; ili kostos ja multe al via malfeliĉa patro!« Kaj li tuj rakontis al sia familio la teturan okazaĵon. Dum tiu rakonto, ambaŭ plej maljunaj filinoj ekkriegis kaj komencis insulti la Belulinon, ke ŝi ne ploras. »Vidu, kion produktas la fieregeco de ĉi tiu knabinaĉo! — ili diris — kial ŝi ne

petis vestaĵojn, kiel ni? Ne! Fraŭlino volis sin apartigi. Ŝi tuj kaŭzos la morton de nia patro, kaj ŝi ne ploras!»

— »Tio estus tute senutila, rediris la Belulino. Kial mi plorus pri la morto de mia patro! Li ne pereos ja. Ĉar la monstro konsentas akcepti unu el liaj filinoj, mi volas min tutan oferi al ĝia furiozeco, kaj mi trovas min tre feliĉa, ke, mortante, mi havas la ĝojon savi mian patron.«

— »Ne, fratino! — diris la tri fratoj. — Vi ne mortos! Ni iros al tiu monstro kaj ĝiaj batoj nin pereigu, se ni ne sukcesos ĝin mortigi.«

— »Ne esperu tion, miaj infanoj — diris al ili la negocisto. — La potenco de tiu Besto estas tiel granda, ke mi antaŭvidas nenian espereblecon ĝin pereigi. Min tuŝas la bonkoreco de la Belulino, sed mi ne volas ŝin dediĉi al la morto. Mi estas maljuna; estas al mi malmulte da travivota tempo; tial mi perdos sole kelkajn jarojn da ekzistado, kiujn sole pro vi mi domaĝas, miaj karaj infanoj!«

»Mi certigas al vi, mia patro, — diris la Belulino — ke sen mi vi ne iros al tiu palaco. Vi ne povos malhelpi, ke mi vin sekvu. Kvankam mi estas juna, tamen mi ne tre ŝatas la vivon kaj mi preferas esti manĝegita de tiu monstro, ol morti pro la ĉagreno, kiun kaŭzus al mi la morto!«

Kion ajn oni kontraŭdiris, la Belulino nepre volis foriri al la bela palaco, kaj kontentegiĝis ŝiaj fratoj, ĉar la virtoj de tiu ĉi junulino naskis en ili gravan jaluzecon. La komerciston tiel premeĝis la ĉagreno perdi sian filinon, ke li jam ne pensis pri la orplenigita kesto. Sed kiam, kuŝiĝonte, li estis ree en sia ŝlosita ĉambro, li mireĝis, ĝin trovante en la apudaĵo de sia lito. Li decidis, ne diri al siaj infanoj, ke li fariĝis tiel riĉa, ĉar liaj filinoj tuj volus reiri al la urbo, dum li nepre intencis morti en tiu ĉi kamparo; sed tiun sekreton li kaŝe komunikis al la Belulino, kiu sciigis al li, ke kelkaj nobeloj venis dum lia foresto, el kiuj du amas ŝiajn fratinojn; ŝi petis la patron, ke li ilin edzinigu; ĉar ŝi estis tiel bona, ke ŝi ilin amis kaj tutkore pardonis iliajn ofendojn. Ambaŭ malbonulinoj frotis al si la okulojn per bulbo, en celo de memplorigo, kiam la Belulino foriris kun sia patro; sed ŝiaj fratoj vere ploris, same kiel la komercisto; ne ploris sole la Belulino por ne pliigi ilian korpemecon. La ĉevalo sekvis la vojon al la palaco kaj vespere ili ĝin ekvidis en la sama iluminiteco, kiel la unuan fojon. La ĉevalo iris sola al la stalo kaj la bonulo eniris kun sia filino en la ĉambregon, kie ili trovis tablon luksege servitan,



kun du manĝilaroj. La komercisto ne kuraĝis manĝi, sed la Belulino, penante ŝajnigi kvietecon, sidiĝis apud la tablo kaj prezentis al li la manĝojn. Dume ŝi diris al si mem: »La Besto intencas min grasigi, antaŭ ol min manĝi; tial ĝi min tiel bone nutras.«

(Daŭrigo.)



## KRONIKA A KOMENTÁŘ.

**Mezinárodní závod pro propagandu esperanta** založen byl v Londýně pod názvem »Internacia propagandejo esperantista« (London S. W. Meurton Abbey). Závod vydává různé pomůcky k šíření známosti o esp. ve všech řečech. Dosud vydal t. zv. »klíče esperanta«, malé to, 5 gr vážící a 5 h stojící knížky, které obsahují esp. mluvnici a slovník, ve větším vydání (za 10 h) ještě esp. povídku (do konce r. 1908 vyšly klíče v 11 jazycích: angl., čes., dán., franc., ital., maďar., něm., portug., rus., špan., švéd.), pak esp. sbírku anekdot jako četbu pro kursy, dopisnice a dopisní obálky s několikajazyčnými nápisy o důležitosti esp. a 3 druhy esp. odznaků různého tvaru a velikosti. Závod velmi čile vedený není podnikem výdělečným, nýbrž docílený zisk vynakládá na nové podniky k rozšíření známosti o esperantu.

Dr. S. K.

**Socialisté pro esperanto.** Přítel naší revue zaslal nám výstřížek z americké »Slavie« (Racine, Wise), dle jejíž zprávy z New Yorku (16. I. 09) národní exekutivní výbor socialistické strany rozhodl se (15. I.) předložiti veškerému členstvu k odhlasování otázku, zdali by nebylo záhodno přijmouti esperanto za úřední socialistickou řeč po celém světě. K tomu připojujeme, že česká soc. dem. stejný návrh, učiněný na sjezdu r. 1899 v Praze red. K. Pelantem, — zamítla a připravila se tak o prvenství. A přece esperantem překonány by byly nesmírné obtíže, jež se jeví při schůzích zástupců několika národností; esperanto jako jednacím jazyk mezinárodních kongresů socialistických a mezinárodního sekretariátu přineslo by jistě značné výhody, jichž organizace charakteru tak eminentně mezinárodního jako je socialistická Internacionála, nemůže trvale přehlížeti.

Rd.

**Mezinárodní řeč policie.** Z Haagu došla zpráva, že mocnosti vyjednávají o tom, aby za sprostředkující řeč policie v zahraniční informační službě zavedeno bylo esperanto, jemuž již oficiálně učí se policisté v Drážďanech, Budapešti, Stockholmu, Kodani, Paříži, Barceloně, Vídni a j.

Nemo.

**Esperanto na mezinárodní výstavě v Bologni.** Výbor mezinárodní výstavy umění, práce, výživy a zdravotnictví v Bologni (břez.-dub. 1909) užívá jako jediného oficiálního jazyka ve stycích s cizinou esperanta. Výbor vydal a do celého světa rozeslal esperantské letáky o výstavě, v oficiálním věstníku výstavním bude otiskovati texty italské a esperantské. Esperantu věnováno je na výstavě také zvláštní oddělení.

Hkš.

**Suhvence městských rad esperantistům.** — Spolek esperantistů v Toulouse obdržel letos — jako loni a předloni — od města subvence 300 fr. — Také spolek esp. v Saint-Etienne dostal od městské rady znovu 300 fr. — Městská rada v Ruen dala místnímu spolku esperantistů 50 franků.

Nemo.

**Sedm národností v jediném spolku esperantistů** zastoupeno je v »Steierischer Esperantisten-Verein« ve Štýr. Hradci, jehož členové ná-

ležeji k těmto národnostem: německé, české, chorvatské, italské, maďarské, ruské a kavkazské. Všichni velmi pěkně se snášejí, což nejlépe projevilo se na večírku pořádaném s »Akademischer Esperanto-Verein« (11. 11.), z jehož bohatého a zajímavého programu zvláštní zmínky zasluhou vystoupení tří dítek Bondiových, které ve způsobu poučné dětské rozmluvy tlumočily myšlenky a snahy pacifistů. Bez neshody a rozepří, ve shodě a přátelství pracují všichni pro společnou ideu. *Fr. Chvatík (Graz).*

**Zamenhofův adresář esperantistů** vyjde v květnu 1909 naposledy, což s uspokojením zaznamenáváme, upozorňující, aby nikdo nezasílal do něho své přihlášky. Kdo chce býti zapsán v adresáři, zašle svoji adresu (na korresp. listku!) p. Čejkovi v Bystřici p. Host., který vydá Adresář českých esperantistů. *Rd.*

**Rozmanitost z esperantského hnutí.** — Anglický denník »Dundee Advertiser«, jeden z nejvážnějších denníků skotských, přinesl v čís. 14.925 (1. 1. 09) objednaný úvodník »The annexation of the Balkan Provinces. A Bohemian View of the Situation (By An Esperantist)«. Tedy cizina sama začíná se informovati o nás — u nás a to esperantem! Nový doklad praktického významu esp. — Franc.-esp. měsíčník »Le Monde espérantiste« otiskuje v rubrice »Chez nos confrères« (U našich spolubratrů) vždy nejlepší článek, který se objevil v posledním měsíci v esp. časopisech. V čísle únorovém (III, 3, 38) otiskuje z lednového »Lingvo internacia« (XIV, 1, 11) Bouskúv překlad Nerudovy arabesky o loretánských zvoncích (Při sonoriloj de Loreta). — Státní cestovní kancelář v Novém Zélandu vydává informační tiskopisy a jízdní řády v esp. — Největší světová cestovní kancelář Th. Cook & Son vydává turistickou příručku v jazyce francouzském, německém, italském a v esperantu; firma ta esperantem také korresponduje. — Gabriel Lippmann, profesor fyziky na Sorboně, vyznamenaný Nobelovou cenou, je členem výboru »Franca esperantisto«. — V pařížských kasárnách koná se 9 oficiálních kursův esperanta. — Přední závodce pařížské, jakými jsou A la Samaritaine, Au bon Marché, Grand Bazar de la Rue de Rennes, Grands Magasins du Louvre, vydávají své cenníky v esperantu a esperantem také korrespondují. — Právě založená Saská liga esperantistů sestává z 55 spolků s 3.000 členy. — Pařížský spolek esp. má přes 1.000 členů. — Dle »Oficiala gazeto esperantista« existovalo 5. ledna t. r. 1242 propagačních, 131 odborných spolků esp., 303 města s esp. konsuláty, 78 esp. časopisů. *Kronikář.*

**Zábavný esperantský večírek v Praze** uspořádal »První dámský český spolek esperantský« 11. února v divadelním sále velkorestaurantu »U Čížků«. Program byl vybraný a provedení bylo vskutku výborné. Roztomilá kandidátka pěvecké slávy sl. Reissova okouzila všechny svým podivuhodným hlasem; zpívala esperantsky i česky písně od Rozkošného (Pro hubinku), Frimla (Sedí slípka), Mayerbeera (Arie pážete z Hugonotů), Novotného (Malříčuloj, Timema knabino). Páni Kaigl a Gallat zahráli virtuózně Dvořákovy »Slovanské tance« a Griegův »Symfonický tanec«. Paní Krausová přednesla původní satyrickou deklamaci »Esperantisto en la ĉielo« od sl. Studničkové, a spolu se sl. Vaníčkovou předvedla aktovku »Malfidela edzo« (rukopisná novinka od téže spisovatelky). Obě dámy hrály své partie s takovým hereckým uměním a s tak pěknou výslovností esperanta, že bylo použitkem poslouchati je. Zasloužený potlesk sklídl tenorista p. Bernard z esperantský přednes arie z Leoncavallova »Sedláka kavalira« a Frimlovy písně »Dum kvietaj noktoj« (Za tichých nocí). Rovněž velice se libila paní Zápotocká, která přednesla humoristické básně sl. Tesařové »Balado pri l'aino de K. Havlíček« a »Malgrandaĵoj«. Překlady přednesených písní

z češtiny do esperanta velmi pěkně provedla zasloužila předsedkyně spolku sl. B. Studnicková.

**České přednášky o esperantu.** — V Olomouci »Klub českých obchodníků« uspořádal dne 3. 11. 09 večírek, na němž o esperantu promluvil pp. Krumpholc (o významu esperanta vůbec a pro malé národy zvláště) a Otruba (o 1V. mezinárodním kongresu esp. v Drážďanech, o významu esp. pro obchodnictvo a živnostenstvo). Přednášky byly velmi působivé, čehož nejlepším důkazem je, že asi 50 osob z přítomných posluchačů přihlásilo se do kursu, který povede p. prof. Fierlinger. — Ve Zlíně uspořádal 2. 11. 09 Sokol přednášku, kterou proslovil p. Krumpholc. — V Praskačce o esp. a drážd. kongresu přednášel p. Jeřábek (18. 11.). — Ve Lhotě Šárově přednášel (31. 1.) p. Šilhart.

**Věřejné kursy esperanta pro Cechy.** — V Praze »První dámský český klub esperantský« zahájil 18. 11. 09 nový kurs esp. pro dámy (přístupný každé dámě), který koná se ve čtvrtek več. (6—8) v místnostech »Ženského klubu čes.« (Jungmanova) za vedení pi Krausové. Také klub ohlásil (na 16. 11.) kurs esp. pro dámy, patrně aby okázal svoji zálibu ve zbytečnostech. Sdružení p. Fr. Kühnla vystupující (neoprávněně) pod názvem »Svaz čes. esp.« zahájilo (6. 11.) kurs v posluhářné techniky (poplatek 2 K); učí p. Ed. Kühnl v úterý a sobotu večer (1/27—1/28). — Na Král. Vinohradech spolek »Blahoslav« koná kurs ve spolk. místnostech (Korunní 62) v pondělí več. (8 h.). — Na Žižkově je kurs v kavárně »Kuklovka« (Štítěho 19) v út. a čtvrt. več. (1/28—1/29). — V Břevnově učí se esp. ve středu a pátek (8—9) v host. »u Trnobranských«. — V Pardubicích v hotelu »Střebský« konají se dvakrát týdně konversační večírky pokročilých esperantistů. — V Plzni esperantský dělnický klub »Zamenhof« zahájil 2. 11. 09 malou přednáškou kurs v klub. místnostech p. Sedláčka (Barandova 14); popl. 2 K. Klub esperantistů má své konversační schůzky v sob. več. (8 hod.) »u Kušejnů«. — V Hradci Králové koná se (od 13. 1. 09) dvakrát týdně kurs esp. na obch. akademii. — V Litomyšli po přednáškách pp. far. Kučery a Procházky (28. 1.) zahájeny byly (3. 11.) dva kursy esp. za vedení p. Metyše, zkoušeného učitele hudby; kursy odbyvaly se ve Smetanově domě od 1/28. h. več.; byly četně navštěvovány, ale následkem divadelní sezony musily býti na měsíc přerušeny. Po jich ukončení uspořádán bude nový kurs pro začátečníky a kurs pro pokročilé. — V Čes. Brodě koná se (od 16. 11.) kurs v restauraci »u Orla« (učí pan V. Pechatý). — Ve Strašíně (u Sušice) zahájen kurs 4. 11.; vyučuje se v úterý a ve středu ve školní budově; kurs vede p. učitel L. Henych. — V Ústí nad Orlicí koná se kurs esp. v úterý več. (8—9) v místnostech odborné školy tkalcovské, navštěvovaný více než 60 účastníky, jež učí pan Aug. Čermák, úředník fy Henych syn. — V Něm. Brodě počalo se vyučovati esp. 18. 11. 09 »u Stolzu« za účasti 23 posluchačů; vyučuje pan uč. Filip ve čtvrtek večer. — Na Polské Ostravě v jubilejní škole na Záměstí (Palackého) zahájil 21. 11. 09 p. Kubala kurs proslovem o významu esp. vůbec a pro dělníka zvláště; vyučování odbývá se ve středu večer (1/27—8) a v neděli odp. (3—5) do konce května za vedení p. Babince. — V Třebíči koná se (od 16. 11.) kurs pro začátečníky v kreslárně dívčí měř. školy (v pátek večer), vedený p. ass. V. Ročkem; v nádražní restauraci učí (ve středu več.) p. inž. Vrbata. — V Hodolanech (u Olomouce) vyučuje esp. v měšťanské škole chlapecké člen obecního zastupitelstva pan A. Horák, c. k. pošt. kontrolor, přes 50 posluchačů, mezi nimiž je mnoho učitelů a učitelk. — V Kolíně n. R. konají čeští esperantisté své schůzky ve čtvrtek večer v pivnici Bawaria (Richmondstr.); konversuje se za vedení pp. Baxy a Buchelta, kteří vedli kurs pořádaný českou besedou »Barák«.

O kursech v Domažlicích, Novém Hradci Králové, Zlíně, Žďáře, V. Meziříčí a Kotoru přístě, jelikož zprávy nás došly po redakční uzávěrce. — K poslední kronice připomínáme, že p. Lustig kurs pro akademiky nepořádá, nýbrž jen v něm vyučuje, což konstatujeme na jeho žádost. *Kronikář.*

**Knihovna českých esperantistů.** Pod tímto názvem »Svaz čes. esp.« vydává důležitou edici, která má program co nejšíří. Vše, co má zajímavost a důležitost s hlediska otázky mezinárodního jazyka, dojde ve sbírce této uveřejnění. Nová sbírka zahájena byla spisem »Úvahy o jazyce mezinárodním«, který obsahuje překlad klassického pojednání z »Fundamenta krestomatjo« »Esenco kaj estonteco de lingvo internacia« (Podstata a budoucnost jazyka mezinárodního) a stručný nástin o rozšíření esperanta. Překlad, ač pořízen několika lidmi, pražskými členy svazu, je jednotný a pěkně se čte; úspěšná snaha, aby překlad byl pokud možno doslovný (aby začátečníci mohli se učiti srovnáváním textů) nebránila nikterak jeho srozumitelnosti a plynnosti. Brožura je stále časová a bude proto jistě hojně čtena. Jako 2. svazek sbírky vyjde pojednání p. Krumpholce »Jazyk všeslovanský a esperanto«. Objednávky přijímá p. Ferd. Boháček, knihkupec v Jevičku a Dr. Kamaryt v Praze VI. (Cena 80 hal., pro členy »Svazu čes. esp.« 64 hal.) *Kamaryt.*

**Informační letáky o esperantu** (po 2 hal) vydává »Svaz čes. esp.«. Právě vydané 2. číslo obsahuje pojednání »Rozšíření esperanta«, které výborně hodí se za propagační pomůcku. Čeští esperantisté, zejména spolky (kterým při hromadných objednávkách poskytnuta sleva 50%), budou zajisté leták ten šířiti co nejušilovněji. Objednávky přijímá Dr. Kamaryt v Praze VI. *Rd.*

**Kraslice s esperantským nápisem** »Ĝojan paskon!« (Veselé Velikonoce), zdobené českým ornamentem, uvede letošním rokem do prodeje »Zádruha«, družstvo pro podporu čes. lid. průmyslu v Praze II. (Příkopy, palác Sylva-Taroucky). Ježto počet i cena (50—60 hal.) kraslice bude stanovena dle počtu objednávek, nutno kraslice ty, českou lidovou práci, objednat (nejlépe esperantsky) již nyní. Čeští esperantisté věnují svými přátelům domácím i zahraničným jako velikonoční pomlázku tyto kraslice. *Rgl.*

**První manifestační sjezd českých přátel esperanta, pacifismu a volné myšlenky**, který připraven byl na svátky velikonoční, bylo nutno pro napjatou situaci politickou odložit na dobu pozdější, která teprve bude stanovena a oznámena. *O. S.*



## INFORMACE A DOKUMENTY.

Jazykový výbor »Svazu čes. esp.« jmenoval dvě zemské komise pro zkušky z esperanta: pro král. České (předs. dr. Kamaryt) a markr. Moravské (předs. učitel Čejka). Členy zkušební komise pro Čechy jsou pp. vrchní likvidátor K. Biskup, H. K. Bouška, dr. Stan. Kamaryt, učitel J. F. Khun a pí. Matylda Krausová. Členy zkušební komise pro Moravu jsou pp. učitel Th. Čejka, prof. Rud. Fridrich, odborný uč. Jos. Grňa, revident Alb. Kroupa a uč. Krumpholc. *O. S.*

**Veřejné zkušky z esperanta** v období jarním budou konány o velikonočích před zemskou komisí »Svazu čes. esp.« v Praze a Brně. Přihlášky ke zkuškám buď o znalosti esperanta nebo o způsobilosti vyučovati esperantu přijímají do konce března předsedové komisí pp. Dr.

Stan Kamaryt v Praze VI (pro Čechy) a Th. Čejka v Bystrici p. Host. (pro Moravu), kteří také na požádání dvojitým korrespondenčním listkem zašlou zkušební řád. O. S.

**Klub českých esperantistů v Brně** konal dne 6. XII. o8 mimořádnou a dne 7. II. o9 řádnou valnou hromadu. Z jednání mimořádné valné hromady zmínky zasluhuje jednak to, že bylo rozhodnuto většinou hlasů, aby klub vystoupil z »Unie čes. esp.« a přistoupil za člena »Svazu čes. esp.«, jednak to, že z klubu vystoupili přátelé ildistických reforem, když předseda p. revident Kroupa, vyličiv vznik ilda, prohlásil, že nepřipustí jednání o přijetí těchto reforem, že klub zůstane věrným původnímu esperantu. Na řádné valné hromadě po odbytých formalitách zvolen byl výbor, jehož členy jsou: Alb. Kroupa, revident stát. drah (předs.), Ant. Waisser, úředník a slč. Milča Genžova, úřednice (místopř.), Dominik Konečný, c. k. pošt. úředník (jedn.), Jan Rössler, adjunkt sp. st. dr. (pokl.), B. Pikeys, techn. úředník (knih.), Fr. Vrtěl, assist. agrár. operací a slč. Leop. Růžičkova, úřednice (revisoři), slč. Mar. Matějkova, úřed., Frant. Journý, dělník, Fr. Ficek, obchodník, Václ. Vaněk, techn. úředník, Jan Skoupý, malíř (členové výboru). Potěšitelným je, že do klubu přihlášily se také dámy a tak položily základ k dámskému odboru. O. S.

**Klub esperantistů v Prostějově** (Bohema klub esperantista en Prostějov) konal svoji ustavující valnou schůzi v neděli dne 7. února 1909. Do výboru zvoleni byli: Rud. Fridrich, professor (předs.), slč. Fr. Škamralova, učitelka (místopředs.), Klement Urban, prof. (jednatel), Ed. Čel, obchodvedoucí (knihovník), Boh. Ošťádal, úředník (pokladník). O. S.

**Kroužek esperantistů v Žižkově** schází se za účelem praktické konversace každý čtvrtek od 8 hod. večer v kavárně »Kuklovka« (Štřítného 19), kde stále vyloženy jsou esp. časopisy (Český esperantista, Čas. čes. esp., La Revuo, La Spritulo, Esperanto) a esp. knihy (Fundamenta krestomatio, Prozaĵoj, Diversaĵoj, Unua legolibro, Elektitaj fabeloj, Rakontoj de Arbes a j.). Pro začátečníky pořádá se veřejný bezplatný kurs v úterý a čtvrtek več. (1<sup>1/2</sup>—1<sup>3/4</sup>) ve zvláštní oddělené místn. (kde netřeba nápoje objednatí); vyučuje p. inž. Vostatek. O. S.



## LIBROJ KAJ GAZETOJ.

**En Svislando.** Kvin rakontoj. El verkoj de sviasaj aŭtoroj tradukis E. Ĥamo. Paris, Librairie de l'esperanto (rue Montmartre 15), 1908. Prezo 3 fr. (104 pĝ., 6 bildoj). — La kolekto enhavas 5 rakontojn elektitajn el la verkoj de bone konataj svisiĝj aŭtoroj: Ed. Rod, Virgile Rossel, Maja Matthey kaj René Morax. Du el ili priskribas epizodojn el la malfacila vivo de montaranoj, alia rakonto skizas kelkajn tagojn el la vivo de malfeliĉaj italaj kamparanoj, la lasta pritraktas specialan flankon de l' intensa vivo de intelekta urbo. En la tuto rebrilas strangaj interesaj kontrastoj, kiujn prezentas malgranda, sed alloga Svisio. Bona traduko estas eldonita en bela, ampleksa volumo akompanata per 6 fotografajoj. Bšk.

**Kanto de triumfanta amo.** Ivan Turgenev. El rusa lingvo tradukis D-ro Andreo Fiser. Paris, Librairie de l'esperanto, 1908. Prezo 60 ctm. (pĝ. 31). — Unu el la lastaj rakontoj de fama rusa verkisto bone tradukita kaj hele eldonita, enhavas impresigajn scenojn, kiuj altiros la plenan atenton de ĉiu leganto. Rd.

**La kaprino de s-o Seguin.** El la »*Lettres de mon moulin*« de *Alphonse Daudet*. Tradukis kaj eldonis *Ad. Versin*, Peseux (Neuchâtel-Svisio). Prezo 15 ctm. (pĝ. 12). — Tiu ĉi eltirajo el konataj »Leteroj el mia muelejo« de Daudet enhavas scenon, kiu rakontas pri la sorto de kaprino, kiu forkurinte de sia mastro en montojn, travivis tie belan tagon, sed teruran nokton kaj fariĝis fine kaptaĵo de lupoj. La traduko estas zorga, kvankam iom tro laŭvorta. *Bšk.*

**La parlamentarisma iluzio** de *C. A. Laisant*. Trad. *F. B. G.* Paris, Internacia asocio »Paco-Libereco« (Maison Communale du III-e, rue de Bretagne 49). Kolekto »Paco-Libereco« No. 6. Prezo 5 sd. (pĝ. 11). — En tiu ĉi broŝuro la verkinto, estinta franca deputito, penas pruvi, ke estas iluzio esperi, ke parlamento faros ion bonan por laboruloj. *Rd.*

**Garcia Moreno.** De pastro *H. M. H. Bartels*. Tradukis *Jolo*. Hago (Holando), *Joh. Luneman* (v. d. Neerstraat 40). »Universala katolika esperanta biblioteko«, n-o 1a. Prezo 15 ctm. (pĝ. 24). — Tiu ĉi n-o de la nova kolekto priskribas la vivon de Garcia Moreno, ŝtatestro de respubliko Ecuador, mortigita en 1875 kaj rememorigata de la katolikoj pro sia pia regado. La tendenco de la broŝuro estas montri, ke la influo de katolika eklezio ne sole ne estas ruiniga por la ŝtato, sed kontraŭe, ke ĝi estas feliĉiga. Kiu volas, tiu povas kredi. *Hkb.*

**Fundamentaj dokumentoj** de *Esperantista centra oficejo*, Paris (rue de Clichy 51), 1909. »Esperantista dokumentaro«, kajeroj 9, 10, 11: 1A 4, 1B 5, 1C 1. Tri broŝuroj po 25 ctm. — La broŝuroj estas represajoj de oficialaj dokumentoj pri la centraj institucioj de esperanto: Konstanta komitato de la kongresoj, Esperantista lingva komitato, Oficiala gazeto esperantista kaj Esperantista centra oficejo. La broŝuroj estos utilaj kaj praktikaj gvidlibroj por la esperantistoj, kiuj multfoje bezonas tiujn ĉi dokumentojn ĝis nun dissemitajn en diversaj eldonaĵoj kaj sekve malfacile troveblajn (la resumon de tiuj ĉi dokumentoj niaj legantoj trovos en la bohemiaj raportoj pri tiuj institucioj). *Hkb.*

**Popola frazilbro en 30 lecionoj gramatike kaj sence laŭgradaj.** De *R. Deshayes*. Paris, Librairie de l'esperanto, 1908. Prezo 60 ctm. (pĝ. 34). — La libreto estas interesa monro, kiel instrui esperanton per metodo de praktikaj frazoj. Estas sendube, ke en la manoj de lerta kaj sperta instruanto ĝi povas fari tre bonan servon. Simpatia estas ankaŭ provo de l' aŭtoro uzi la lernolibron por propagando de siaj progresemaj ideoj (en la lastaj ĉapitroj), kvankam tio ĉi kredeble ne plaĉos al ĉiuj. *Bšk.*

**Ŭvahy o jazyce mezinárodním.** Praha, Svaz českých esperantistů, 1909. »*Knihovna čes. esp.*«, sv. 1.; 80 h (str. 40). — Tiu ĉi broŝuro estas bohema traduko de konata artikolo »Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia« en »*Fundamenta krestomatiko*«. Al la traduko farita de kelkaj membroj de »Boh. asocio esp.«, estas aldonita ĉapitro pri la disvastiĝo de esp. en la mondo. La libreto enhavanta multegon da konvinkantaj argumentoj lerte kaj sugere prezentitaj estas bonega propagandilo, kiun bohemiaj propagandantoj certe efike uzados. Per ĝi »Boh. asocio esp.« komencas serion da informaj verkoj nomitan »*Knihovna českých esperantistů*« (Biblioteko de bohemiaj esperantistoj), entreprenon vere subtenindan. *Rd.*

**Lingvo internacia** eniras jam dekkvaran jaron de sia ekzistado. La 1-a n-o enhavas interesan paroladon »Nuna ŝtato de l' aviado« de ko-

nata aeronautikisto E. Archdeacon esperante faritan 27. XII. 08 en »Grand Palais« de Paris por pli ol 500 esperantistoj, kiuj ope vizitis »Premier Salon de l' Aéronautique«. En la artikolo »Deci, konveni; trafi, atingi; fini, ĉesigi; sciigi pri« s-o de Lengyel klarigas la sencan de tiuj vortoj kaj la diferencon inter ili: deci = sekvi la kutimajn konduktregulojn, agadi plaĉe, konduti neriproĉeble; konveni = konduiti tiel, kiel la cirkonstancoj postulas; trafi = fakte tuŝi konkretaĵon per almovo de alia konkretaĵo; atingi = veni en la saman stacion, en kiu iu aŭ io jam estas; fini = nedaŭrigi iun agon, ĉar ĝi estas pretfarita; ĉesigi = nedaŭrigi iun agon, kvankam ĝi ne estas ankoraŭ pretfarita. En la sama n-o estas rakonto de Jan Neruda »Pri sonoriloj de Loreta« (el »Arabesky« trad. H. K. B.). En la 2-a n-o klarigas prof. Cart »Kiamaniere helpi al la lingva komitato?« S-o Era, ŝatata kunlaboranto de nia revuo, raportas detale pri la doktora tezo de Dro Corret »Utileco kaj ebleco de la alpreno de lingvo internacia en medicino.« *Bšk.*

**Espero katolika.** Internacia monata gazeto. Red. Paris, rue Béranger 10. Adm. Paris, rue Joubert 23. Jara abono 2 Sm. — Jam de longe havas katolikoj sian esp. organon fonditan kaj dum 5 jaroj ofereme, tre ofereme, eldonatan de s-o pastro Em. Peltier, kiu nun grave malsaniĝinta fordonas la redaktadon al s-o Colas. — El multaj artikoloj de n-o 51-a (VI) ni citas: Pri la eklezio en Anglujo, Kristanismo kaj pacifismo, La Kristostatuto de la Andes, Kreado de katolika esperantista oficejo, propagandejo kaj konsulejo. *Hkb.*

**Esperanto.** Oficiala organo de *Universala Esperanto-Asocio*. Red. kaj adm.: Genève, rue Bovy-Lysberg 8, Svisio. Jara abonpago 1'60 Sm. (La abonpagon el Aŭstrio akceptas Dro Stan Kamaryt, Praha VI). — Tiu ĉi gazeto eldonata en la formo de ĵurnalo kaj redaktata sole en esp. enhavas artikolojn kaj sciigojn el la tuta mondo pri la politiko, juro, komerco, industrio, nacia vivo, arto, literaturo ktp. verkitajn de kunlaborantoj de la plej diversaj nacioj. Ĝi estas la plej legata kaj malplej multekosta dusemajna gazeto internacia. Ĝi enhavas ankaŭ oftajn artikojn pri aferoj bohemiaj regule sendatajn de konstanta kunlaboranto S. K(amaryt) el Praha. — El la n-o 49-a (V) la plej ŝatinda artikolo estas »La aŭtora propreco« (J. S.) *Hkb.*

**Internacia socia revuo.** Monata esperanta gazeto. Red. kaj adm.: Paris 3-e, rue de Bretagne 49, Maison commune du 3-e (R. Louis). Jara abonpago 1'40 Sm. — Tiu ĉi gazeto »internacie redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon«, estas ligilo de esperantistoj-ruĝuloj: socialistoj, anarkistoj, sindikatanoj kaj kooperativanoj. — El la lasta n-o (III, 2): Pri Ruslanda intelekta proletariato, La laborista opozicio en Itallando, La nzurekta esplotado, Virina laboro en Japanujo, La sociala kaj psika elemento de kristaneco ktp. *Rd.*

**Juna esperantisto.** Monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj esperantoj lernantoj. Red. kaj adm.: Paris, rue Lacépède 33, Francujo. Abonprezo 1 Sm. — Du gimnazianoj, tiame 13-14 jaraĵ knaboj, Hodler kaj Privat, fondis antaŭ 6 jaroj ĉi tiun revueton, kiu nun estas unu el la plej malnovaj gazetoj esperantaj. — Jen la enhavo de la 1-a n-o de la nova, jam sepa, jarkolekto: Nia historio, Mino, Ursidoj, Sur la laguno, Zodiako, Obstina vojaĝanto, Amuzajloj. *Rd.*

**Informaj raportoj** (III, 2) enhavas nun literaturan aldonon enhavantan rakonton de Fr. de Motte Fouqué »Ondino« (trad. K. Myslík). *Rd.*

**The British Esperantist** (IV, 48, 49; V, 50). S-o W. W. Mann priparolas »Kondukataj interparoladoj« metodon, kiel instigi al esp. interparolado timemajn lernantojn. Li konsilas, ne organizi solenajn kaj ceremo-

niajn debatojn, sed dividi la partoprenantojn en malgrandajn rondetojn kiom eble laŭ sperteco kaj reciproka simpatio, difini al ĉiu rondo gvidanton pli lertan ol ceteraj; al la rondestro ĉiu rondano sciigas sur papera folieto temon, kiun li konsilas preparoli; oni preparolas unu temon post la alia ĉiam sole tiel longe, ĝis kiam ĝi ĉiujn interesas. Tiel oni kuraĝigas paroli homojn, kiuj en ordinarnaj debatoj estas devigataj sidi silente. *Rd.*

**Paris-Esperanto.** Organo mensuel du *Groupe Esperantiste de Paris*. Red. kaj adm.: Paris V, plase Jussieu 3 (M. V. Chaussegros). Jare 60 Sd. — La gazeto kiel oficiala organo de Esperantista federacio de Paris'a regiono enhavas societajn avizojn, sciigojn, raportojn ktp. N-ro 25-a (111) komencas per nekrologio pri Dro Roblot (de C. Bourlet). *Rd.*

**Greklingva esperantiano.** Monata revueto, oficiala organo de la *Samosa esperantista societo*. Red. & adm.: Samos, Esperantista societo, Turkujo. Jare 1'20 Sm. Dulingva, grekesperanta, gazeto kun paralelaj tekstoj, kies 1a n-ro ĵus eliris. *Rd.*

**Rumana gazeto esperantista.** Monata oficiala gazeto de l' *Federacio de la esperantistaj societoj el Rumanujo*. Red. & adm.: Bukarest, Str. Coltei 16, Rumanujo. Jare 1'20 Sm. — Rumanesperanta gazeto en formo de ĵurnalo, enhavanta multan materialon propagandan. El la 2 unuaj n-roj oni ekscias pri la fondo de Federacioj de la societoj esperantistaj el Rumanujo. *Rd.*

**Progreso.** Oficiala organo di la *Delegitaro por adoplo di Linguo helpanta internaciona*. Red. & adm.: Paris 5, rue Pierre-Nicole 7 (Dr. Coururat). Jare 2 Sm. — La revuo redaktata komence en esperanto kaj ildo (internaciona linguo di la delegitaro, nun preskaŭ ekskluzive en ildo estas «konsakrata ad la propagado, libera diskutado e konstanta perfektigado di la linguo internaciona». Ĝi enhavas lingvajn diskutojn kaj kritikojn kaj kronikajn raportojn. La ĉefa rubriko «Linguala question» montras (se oni ne rigardas la konfuzajn «kritikojn» de personoj nekompetentaj), ke la iniciatintoj estas lertaj kritikantoj, sed ne tro lertaj konstruantoj, ke ili certe neniam kreos ion pli bonan kaj pli simplan ol estas esperanto, kvankam kelkaj iliaj ideoj meritas la atenton. — En la 12a n-ro (1) estas en esp. sole notizoj pri la kazo objektiva kaj pri ist, er, or. *Bsk.*

**Ricevitaj eldonadoj** (pri kiuj ni ne parolas supre). — *Internacia sciencia revuo* (VI, 62). — *Voĉo de kuracistoj* (II, 3). Kun «Feliĉtono». — *Oficiala gazeto esperantista* (I, 7). Represo de fundamentaj dokumentoj. — *Tra la filatelio* (I, 9). — *Dia regno* (II, 3). — *La Barhiro* (I, 1). — *Germana esperantisto* (VI, 5). — *Pola esperantisto* (IV, 2-3). — *Belga esperantisto* (I, 4). — *Svisa espero* (VII, 2). — *Tutmonda espero* (II, 14). — *Roma esperantisto* (I, 12). La n-ro enhavas bedaŭrindan sciigon, ke la gazeto ĉesas eliradi. — *La Holanda pioniro* (I, 5). — *La Suno hispana* (VI, 62). — *Sciiganto* (I, 3) anoncas aperon de «Hungara esperanto». — *La Verda standardo* (IV, 5). — *Normanda stelo* (II, 3). — *La Londona gazeto* (I, 5). — *Esperanta abelo* (ĉe Aĉilo Tellini, Bologna, Italujo): Ex libris kaj artaj markoj (10 Sd.). — *Katalogo de produktadoj de l' eŭropa ĝardeno* (Tellini). — *Katalogo de Librerie de l' espéranto* (juin 1908). — *Va internacia esperantista kongreso*. 11a cirkulero. — *Ĉiostudenta asocio*. Bohema teksto. — *Internacia instituto de esperanto*. Cirkulero n-ro 1a. — *Recent progress of esperanto*. Represaĵo el The British Esperantist. — *Die Welt-sprache der Zukunft!* Flugfolio de prof. dr. Lorenz. *Germana guidlibreto* 11da ŝlosilo por Germanoj. *Rd.*

Zodpovědný redaktor: Dr. Stan Kamaryt. — Nakladatel Ferd. Boháček, knihkupec. — Tisk «Politiky» v Praze.